

# Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto  
**120**  
printempo 2020



leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

## **federacia retejo**

<http://www.esperanto-provence.org>

## **nia federacio sur Facebook**

[http://www.facebook.com/  
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

## **prezidanto**

Pierre Oliva  
Eden Park n° 99  
2772 Montée du Vieux Camp  
83330 Le Castellet  
06 76 55 57 23  
nlpolecamp@gmail.com

## **aliĝkoto (kun la gazeto)**

**6 €**

ĉeko al:

"Espéranto-Provence"  
pere de via loka asocio  
aŭ sendota al la kasisto  
Nicole Lafitte  
(ĉe la supra adreso de  
Pierre Oliva)

## **sekretario**

## **redaktoro kaj enpaĝiganto**

Pascal Vilain  
48 avenue Alexis Godillot  
83400 Hyères  
06 42 19 68 51  
pascalvilain83@gmail.com

## **limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n° 25-a de junio 2020**

bonvolu sendi al la supra retadreso

<<>>

antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

## **Vorto de la Prezidanto**

«Izolado» iĝis nuntempe la plej grava kaj uzata vorto!

Same kiel mi, vi sendube ne plu povas labori ĉirkaŭ vi por esperanto. Feliĉe plu eblas kontaktoj kun viaj lernantoj danke al komputiloj kaj Interreto. Ne gravas, se vi malpli aktivis; via plej ega zorgo estu via sano! Mi esperas, ke la nuna situacio ne tro longe daŭros, ĉar ne ĉiam estas facile obei la registaran ordonon pri neeliro, kiu tamen estas la sola maniero bone protekti sin kontraŭ la viruso. Fartu bone !

Nicole kaj mi dankegas ĉiujn geamikojn, kiuj skribis amikajn vortojn kaj subskribis la poŝtkarton senditan el la Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres, en kiu ni bedaŭrinde ne povis partopreni ĉijare. Tio ege kortuŝis ambaŭ nin !

*Pierre Oliva*



## **enhavo**

2	kronviruso 2 specialaj paĝoj	11	paĝo de la komencantoj
4	membro-kunveno protokolo	12	agendo
8	el la regionaj asocioj	+	reta suplemento pri Reunio
10	zeo en Gargas	+	reta suplemento pri MES



## Kion fari hejme ?

Ĉiu el ni spertas devigan restadon en sia hejmo.

Mi certas, ke vi tute ne enuas. Esperantistoj havas ja la kutimon lerni, legi, verki, traduki...

La trudita izolado ebligas al ni finfine plani multe da prokrastitaj agoj.

Se tamen vi ne trovis ideojn, Espéranto-France disponigas al vi liston de farindaĵoj.

Ili estas en la n° 110 de Esperanto-Aktiv, sub la titolo "**Restez à la maison... avec l'espéranto**".

Jen la enhavo :

- devenir un champion de lecture
- participer à Vikipedio
- enrichir les banques de données vocales
- écouter de la musique
- communiquer sur les réseaux sociaux, en espéranto

[La tuta artikolo, en la franca, legeblas ĉi tie.](#)



*Vi trovas la ligon por senpage legi "Monaton"-n en la artikolo de Esperanto-Aktiv*



TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) publikigis alvokon en kiu ĝi petis, ke homoj sendu rakontojn pri sia sperto en tiu malfacila momento por la tuta mondo. Kontribuis dekoj da esperantistoj el plej diversaj partoj de la mondo. Ili rakontis pri la situacio en siaj landoj, donis konsilojn pri kion fari dum restado hejme.

Sed plej grave, ili donis ankaŭ grandan mesaĝon de espero.

[Spektu la filmeton en YouTube.](#)



En Youtube estas spekteblaj ankaŭ intervjuoj de Katalin Kovats pri la kronviruso

- kun Margaret Zaleski-Zamenhof, kuracistino : <https://www.youtube.com/watch?v=cS7D3GxkqTk&t=378s>
- kun José Antonio Vergara, epidemiologo : <https://www.youtube.com/watch?v=Exr1ASbnDV4>
- kun Amri Wandel, sciencisto : <https://www.youtube.com/watch?v=zO0B5H8p5WA&t=60s>
- kaj aliaj...

## Viruso... kaj literaturo

Kaj oni restis hejme.  
Kaj legis librojn kaj aŭskultis.  
Kaj ripozis kaj ekzerciĝis.  
Kaj artumis kaj ludis.  
Kaj lernis novajn estmanierojn.  
Kaj haltis.

Kaj aŭskultis pli profunde...  
Unu meditis.  
Alia preĝis...  
Tria dancis...  
Kvara renkontiĝis kun sia ombro.  
Ili komencis pensi alimaniere.

Kaj oni resaniĝis.  
Kaj, en foresto de homoj vivantaj  
sencie, danĝere,  
sence kaj senkore,  
eĉ la Tero komencis resaniĝi.

Kaj, kiam finiĝis la danĝero  
kaj la homoj denove renkontiĝis,  
ili kune priploris la mortintojn.  
Kaj alprenis novajn decidojn.  
Kaj sonĝis novajn bildojn.  
Kaj kreis novajn vivo-formojn.  
Kaj la Teron tute resanigis  
kiel ili estis resanigitaj.

### Miguel Fernández

Amikino mia, bona hispana poetino, plusendis al mi hispanigon de poemo hipoteze verkita de iu Kitty O'Meary en la angla lingvo dum supozata epidemio de pesto en 1800. Rete mi konstatis, ke tiu poemo "viruse" disvastiĝis en Italio kaj disvastiĝadas en Hispanio, sen scio kaj supozo pri la identeco de Kitty O'Meari (aliaj nomas ŝin O'Meara). Iel aŭ alie, la granda sukceso de la poemo, ties kapablo kortuŝi homojn el diversaj mondopartoj kaj semi en ili esperon ĝuste en ĉi teruraj momentoj igis min pensi pri la oportuneco esperantigi ĝin por kunfesti kun vi ĉiuj la Tagon de la Poezio 2020. Sanon kaj poezion!

### Kiel nomi la viruson Covid-19 ?

Por la viruso, kiu aperis en Ĉinujo en decembro 2019 (kaj aliaj virusoj el la subfamilio science nomata "Orthocoronavirinae"), la Lingva Konsultejo de la Akademio de Esperanto rekomendas la formojn (en alfabeto sinsekvo) "koronviruso" aŭ "kronviruso".

La konsultejo samtempe malrekomendas la jam uzatajn formojn "koronaviruso" (kiel facile misanalizeblan) kaj "koronaria viruso" ("koronaria" estas anatomia termino tute sen rilato al la koncerna viruso).

*Cyril Robert Brosch - Direktoro de la Lingva Konsultejo*

### Liven Dek

Hispanio estas nun, same kiel aliaj eŭropaj landoj, en Stato de Alarmo. Neniu povas forlasi sian hejmon. Mi verkis la mikro-novelon "sed hejme plej ĉarme" en la jaro 2008. Nun ĝi ŝajnas oportuna.



### ... sed hejme plej ĉarme

Eta ĉambro. Malvarma kaj profunda silento, reliefigita de la teda takto de mekanika horloĝo. Sur la planko, du infanoj ludas. Apude, la patro legas ĵurnalon kaj la patrino trikas puloveron...

Subite ŝi murmuris tradente, iom melankolie:

—Kiomfoje vi legis tiun artikolon en la lastaj monatoj?

Silento. Longa, tre longa silento kun tiktakoj, ĝis la viro frustras senemocie, ne levante la okulojn de sur la ĵurnalo:

—Tiomfoje kiom vi malfaris tiun puloveron por triki ĝin denove.

Ekstere, super ili, super tiu silento kun tiktakoj, la tera surfaco tradormas falsan nokton de nuklea vintro.

## Ĉu vi ne forgesis pagi vian aliĝkoton - 6 € - por la jaro 2020 ?

ĉeko al Esperanto-Provence - ĉu pere de via loka asocio, ĉu rekte al nia kasisto,

Nicole Lafitte (adreso je la unua paĝo)

**Dankon!**

## N'avez-vous pas oublié de payer votre cotisation - 6 € - pour 2020 ?

chèque à Esperanto-Provence - soit par l'intermédiaire de votre groupe local, soit directement à notre trésorière,

Nicole Lafitte (adresse en première page)

**Merci !**

## Federacia agado

### Procès-verbal de l'Assemblée Générale d'Espéranto-Provence

Le 1er mars 2020, aux Issambres (83)

La séance est ouverte à 14h30.

Présents : 21

Pouvoirs : 8

#### 1. Salutations du président Pierre Oliva

*P. Vilain* : Pierre Oliva et Nicole Lafitte sont retenus par des soucis familiaux, et m'ont chargé de vous saluer en leur nom.

#### 2. Quorum

Nous sommes 21 présents et 8 pouvoirs, ce qui fait 29 sur 79 membres (2019). Il est à noter que les statuts de la fédération ne fixent pas de quorum.

#### 3. Remarques sur le compte-rendu de l'exercice précédent et approbation

*P. Vilain* : J'ai reçu quelques petites remarques sur des points de détails. J'ai mis à jour le compte-rendu, et n'ai pas eu de remarques supplémentaires.

Le compte-rendu de notre assemblée générale de l'année dernière est donc approuvé à l'unanimité.

#### 4. Nomination du président et du secrétaire de séance

Président : P. Vilain ; Secrétaire : T. Spanjaard

#### 5. Rapport moral

*P. Vilain* : Le rapport moral a été diffusé avec la revue de janvier.

Les points principaux sont les suivants :

- Le nombre de nouveaux membres de nos associations est soit stable soit en baisse. Nous savons que des jeunes apprennent l'espéranto mais nous ne les connaissons pas, et ils ne sentent pas le besoin de nous contacter.

- *P. Vilain* : à Hyères, nous avons annoncé le café linguistique dans Var-Matin, et avons vu venir à nous trois personnes qui apprennent ou qui ont appris l'espéranto dans le passé.

- *T. Spanjaard* : à Marseille, nous avons maintenant 19 membres, ce qui est une croissance par rapport aux années précédentes, mais seulement 3 ou 4 participants réguliers à nos activités.

- *M. Prezioso* : L'an dernier, trois personnes nous ont contactés, et n'ont plus donné signe de vie ensuite.

- *P. Vilain* : P. Oliva a offert la Metodo 11 et Espéranto-Express à la médiathèque du Beausset, et est heureux de voir que les livres sont empruntés, mais il n'a malheureusement pas plus d'informations.

- Nous devons constater qu'il y a des jeunes qui apprennent l'espéranto, mais ne participent pas à nos activités. P. Vilain contactera Axel Rousseau, coordinateur des cours d'Espéranto-France, pour savoir s'il est possible d'obtenir les noms et coordonnées des personnes qui apprennent l'espéranto dans notre région.

#### 6. Rapport d'activités et discussion

*P. Vilain* : Au 31.12.19, nous étions 79 membres (à comparer avec les 86 de 2018). A ce jour, en mars, nous sommes 77 membres pour 2020. Il est à noter que plusieurs membres n'ont pas encore payé la cotisation 2020, on peut donc supposer que ce nombre va augmenter.

*M. Arnaud* : A propos de Gap, l'association est en perdition, je pense même que le président et le trésorier n'ont pas payé leur cotisation.

*P. Vilain* : Manosque et Gap sont en sommeil. Saint-Raphaël est le club le plus important en nombre de membres, Marseille celui qui a le plus d'activités.

Le Beausset est actif. Avignon : il se passe des choses. À La Ciotat, il n'existe pas d'association mais les activités sont organisées au nom d'une antenne d'Espéranto-Provence. Mais seule R. Triolle travaille.

« Quand je mourrai, il n'y aura plus rien ! », dit Renée. Hyères fonctionne de même comme antenne d'Espéranto-Provence.

Les associations de la Roque d'Anthéron et Miramas existent sur le papier mais ne sont pas actives.

### notre fédération

- Président : Pierre Oliva
- Secrétaire : Pascal Vilain
- Trésorière : Nicole Lafitte
- Autres administrateurs : Monique Arnaud, Marc Gallardo, Thierry Spanjaard, Renée Triolle, Gilles Wallez.
- Responsable du bulletin : Pascal Vilain
- Responsables du site web : Thierry Spanjaard et Pascal Vilain
- Représentant auprès d'Espéranto-France : Pascal Vilain, suppléante : Renée Triolle.

*P. Vilain* : Y-a-t-il des candidats à un poste d'administrateur ?

Aucun candidat ne se manifeste dans l'assistance.

*P. Vilain* : Le comité a choisi d'intégrer Josiane Moirand en son sein.

L'assemblée générale approuve à l'unanimité.

### cours, stages, examens

*P. Vilain* : Il y a des cours à Saint Raphaël, Le Beausset, La Ciotat, Marseille et Avignon.

#### stages

- Le Beausset fin novembre début décembre.
- MES (Mediterranea Esperanto-Semajno), stage organisé par le club de Saint-Raphaël en mars.

#### examens

*P. Vilain* : Les examens de l'institut français d'espéranto (FEI) ont eu lieu dans le passé à Marseille, et maintenant au Beausset.

*R. Triolle* : On pourra organiser les examens à Marseille ou au Beausset, si nous avons des candidats.

*M. Prezioso* : Nos jeunes ne sont plus très jeunes...

### communication

*P. Vilain* : Le Monde de l'Espéranto est distribué aux groupes par Espéranto-France, à charge de les distribuer aux membres, médiathèques, collèges, bibliothèques, etc...

Des cafés linguistiques ont lieu à Marseille et Hyères chaque mois.

*R. Triolle* : Exposition au Lycée de la Méditerranée à La Ciotat en 2019.

*A. Mouren* : J'ai proposé à la médiathèque de l'Alcazar de les abonner à une revue espérantiste, mais ils ont refusé.

*P. Vilain* : Nous avons été bien reçus à la médiathèque de Hyères, où a même été créé un fonds d'archives espérantistes local.

*A. Mouren* : Pour info, dans le Tarn, deux groupes ont disparu en 2019.

*T. Spanjaard* : Il y a d'autres pratiques de l'espéranto, par exemple Telegram qui possède un grand nombre de groupes d'espérantistes.

*R. Triolle* : D'autre part, des gens viennent à nous parce que nous avons toujours un contact physique alors que le monde devient virtuel.

*L. Prezioso* : Des cyclistes en séjour ici cette semaine se sont intéressés à l'espéranto.

*P. Vilain* : Il y a eu des articles de Vincent Jacques, président d'Espéranto pour l'Europe, suite au Brexit, pour insister sur le fait que l'anglais a perdu en légitimité dans le cadre de l'Union Européenne. Il est tout à fait d'accord pour participer au bureau d'Espéranto-France.

*R. Inaudi* : Il existe une commission espéranto à Europe-Écologie-Les Verts qui œuvre pour que l'espéranto soit reconnu au niveau européen.

*P. Vilain* : Nombre d'activités des clubs de PACA sont rapportées dans notre bulletin. Nous pouvons également ajouter une partie espéranto à des événements existants, comme la journée de l'Europe ou la journée de la langue maternelle comme RT le fait à La Ciotat.

*M. Arnaud* : Je vais aller dans les collèges pour la journée de la langue maternelle.

*A. Rémy* : Carmen le fait également à Saint-Raphaël.

*M. Prezioso* : On a proposé au Lycée Saint-Exupéry de Saint-Raphaël une rencontre entre les stagiaires russes de la MES et les élèves de la classe de russe, mais nous avons essuyé un refus.

### Événements à venir

- MES 2020
- Stage au Beausset en novembre/décembre 2020

Le rapport d'activités est adopté à l'unanimité, moins une abstention.

**7. Rapport financier** (présenté par Pascal Vilain, en l'absence de la trésorière Nicole Lafitte, représentée)  
P. Vilain donne lecture du bilan financier 2019 établi par Nicole Lafitte.

Le rapport financier est adopté à l'unanimité, moins une abstention.

L'assemblée donne quitus à la trésorière.

## 8. Projets 2020-2021

### Stage au Beausset

*P. Vilain* : P. Oliva organisera de nouveau le stage au Beausset en novembre ou décembre.

**Examens de FEI** : niveaux 1 et 2

*R. Triolle* : Je fais les sujets, je trouve les profs... A vous de trouver les candidats.

*P. Vilain* : Nous avons une candidate, pour le niveau 1. Les examens auront lieu en juin.

### Gap

*M. Arnaud* :

- Actions dans les établissements scolaires.
- Le 28 juin : Fête du mouvement de la paix à Gap.
- Le 2ème weekend de septembre : Foire bio génépi à Embrun.

### La Ciotat

*R. Triolle* :

- Cours réguliers.
- Le Monde de l'Espéranto est distribué dans les bibliothèques et dans les lycées de Marseille.
- Accueil de tournées de conférenciers. La difficulté est que le plus souvent on se limite à La Ciotat et Marseille.
- On participe à la journée de la femme, la journée européenne, la journée de la langue maternelle, etc...
- Nina Korjnevskaja, de Ufa, va venir intervenir dans les lycées à La Ciotat.

*R. Inaudi* : Nous sommes allées avec R. Triolle au Collège Monod, aux Pennes-Mirabeau, pour la Journée de la Tolérance. Textes traduits par R. Triolle. Le collège Monod a une section internationale. Nous allons intervenir de nouveau avec R. Triolle.

### Le Beausset

*R. Triolle* : Il y a eu la remise des diplômes avec article dans le journal.

### Manosque

*M. Arnaud* : On ne s'écrit même plus...

## Marseille

*T. Spanjaard*:

- Nous avons des cours chaque semaine, R. Triolle s'en charge.
- Nous avons des réunions de conversation chaque semaine également.
- Le premier jeudi de chaque mois, nous organisons un café linguistique, dont le but est de parler en espéranto et de parler d'espéranto, dans un lieu public et visible. Nous nous réunissons maintenant à la brasserie les Danaïdes, ce qui n'est pas satisfaisant.
- Nous allons participer au Forum des Langues du Monde le 6 juin, au Palais Longchamp.
- Nous participons chaque année à Vivacité, la foire aux associations, début septembre.
- En quelques années, l'association a plus que doublé son nombre de membres : de 5 en 2013 à 19 membres ayant déjà payé leur cotisation 2020.
- Semaine de l'Espéranto à Marseille en septembre. Toutes les bonnes volontés d'Espéranto-Provence sont bienvenues. Il nous reste à trouver le lieu...
- J'envoie chaque mois une newsletter d'information sur les activités d'Espéranto Marseille, n'hésitez pas à me faire passer les coordonnées (prénom, nom, courriel) des personnes potentiellement intéressées.

## Saint-Raphaël – Fréjus

*M. Prezioso*:

- Réunions tous les mercredis après-midi, sauf durant les vacances scolaires.
- Pique-nique en juin, plage du Dramont.
- Repas de fin d'année en juin aux Issambres.
- Forum des associations le premier dimanche de septembre, s'il y a quelqu'un pour tenir le stand.
- Zamenhofa tago, galette des rois.

*L. Prezioso*

- Si nous ne trouvons pas d'aide, la MES va disparaître. *P. Vilain* : Si j'ai bien compris, J-F. Cousineau est prêt à aider...

## Avignon

*R.M. Quintin*: Tant que je pourrai....

- Nous avons un élève débutant.
- Nous ne sommes plus que quatre personnes. Je ne sais pas ce que le club va devenir.
- On prévoit un pique-nique le 21 juin.
- On s'interroge sur la Zamenhofa Tago.

## Aix-en-Provence

R. Triolle : Je prévois un pique-nique le dimanche 5 avril avec Josiane Moirand.

J. Moirand: Nous restons à trois : Sylvaine Le Magadure, Mireille Pacheu et moi.

Sylvaine fait des pièces de théâtre en espéranto, et utilise la structure du groupe pour cela.

## Guillaumes

P. Chavignon : Il n'y a pas de club. Mais durant un certain temps, j'ai donné des cours.

La mairie a mis des panneaux indiquant une chapelle en plusieurs langues, dont l'espéranto. J'ai quelquefois des visites d'espérantistes, par exemple un jeune Guatémaltèque qui vient bientôt.

## Hyères

P. Vilain : Pour l'instant, un café linguistique le dernier mercredi de chaque mois.

Pourquoi ne pas participer aux tournées des visiteurs espérantistes étrangers...

## 9. Questions diverses

### La Espero en version symphonique

R. Inaudi : En fin de compte, nous ne l'avons pas fait. Mais l'orchestre symphonique de Saint-Petersbourg l'a fait. Et maintenant il existe une version de la Espero sur l'internet.

R. Inaudi et M. Gallardo : Nous avons été à l'origine de l'idée de faire une version symphonique de la Espero. Nous avons cherché de l'argent, informé beaucoup de monde en Esperantujo. Et c'est très probablement ce qui a déclenché le projet du chef d'orchestre de Saint-Petersbourg.

### Mutualisation du travail

M. Arnaud : Mutualisation du travail. On prépare des choses chacun dans son coin. Par exemple, j'ai fait une présentation sur l'espéranto pour le collège de Saint-

Bonnet, sur la base du Powerpoint d'Anna Löwenstein.

P. Chavignon : On pourrait avoir un forum d'échanges.

T. Spanjaard : Je propose de créer un groupe Telegram Espéranto-Provence.

## Rencontres

R. Triolle : Certains cherchent des rencontres réelles, et non sur le net. Il y a quelques années, on faisait « l'espéranto hors les murs », pour visiter un quartier, une expo, etc... Cela suppose qu'une personne se charge d'organiser.

## Établissements scolaires

R. Triolle : Contacts avec des établissements scolaires, bibliothèques et médiathèques pour diffuser le Monde de l'Espéranto (et Espéranto Infos).

P. Vilain : Espéranto Infos contient nombre de fautes.

## Grézillon : Espéranto et naturisme

T. Spanjaard : Information sur le festival naturiste au château de Grézillon les 18 et 19 juillet, où il y aura un stand espéranto, et la semaine 20-24 juillet qui alliera espéranto et naturisme, pour la première fois à Grézillon.

## Projet de voyage à vélo

A. Rémy : je propose un projet pour la promotion de l'espéranto. Je voyage à vélo, et rencontre des espérantistes un peu partout. Ils souhaiteraient être informés plus tôt de mon arrivée pour convier la presse. Je pourrais faire un voyage en Europe en allant chez des espérantistes pour faire la promotion de l'espéranto, de manière planifiée et organisée. Il faut entre 100 et 150 km entre chaque arrêt. Je vous demande de m'aider à organiser cela pour 2021.

*L'ordre du jour étant épuisé,  
la réunion est clôturée à 17h01.*





### 13 - Espéranto - La Ciotat

Renée Triolle

#### Galette républicaine – mercredi 15 janvier

Traditionnellement, Espéranto-La Ciotat organise son assemblée générale avant de tirer les rois. Si le club participe activement aux "Journées" en lien avec les langues, le résultat auprès des Ciotadens prêts à en entreprendre l'étude reste maigre. Avec beaucoup d'humour, Alain Rémy a corrigé "galette des Rois" en "galette républicaine", qui a été dégustée de bon appétit.



#### Tago de la gepatra lingvo

Ĉiujare, Espéranto - La Ciotat invitas al amika vespero, ĉijare la 22an de februaro en le Grand Portique. Malfacile estas varbi "ekzotikajn" lingvojn eĉ se surstrate ni aŭdas ilin. Informo estas farita per afiŝoj en kulturaj lokoj aŭ vendejoj, informilo en la urba bulteno aŭ loka gazeto "La Provence". Inter la dekduo da ĉeestantoj, interese estis, ke tri unuan fojon ĉeestis, sed la sukceso de la vespero certe ŝuldiĝas al Titi, ĉinino el Vietnamio, renkontita en aŭtobuso, kiu ne nur kontribuis per interesaj intervenoj sed ankaŭ per gastronomiaj specialaĵoj dum la aperitivo!

Le 21 février 1952 à Dacca (future capitale du Bangladesh) la police tire sur les étudiants qui manifestent pour avoir le droit d'étudier dans leur langue, le bengali, plutôt qu'en anglais, la langue imposée par l'occupant. Cette date a été choisie par l'ONU pour mettre à l'honneur la langue maternelle, celle dans laquelle chacun construit son rapport au monde et à la réalité. Sur les 6800 langues encore existantes aujourd'hui, une disparaît tous les quinze jours. Ce sont les langues parlées par peu de gens, ou des peuples autochtones, souvent orales, mais qui toutes portent des savoirs locaux, très utiles pour sauver notre planète.

Pourquoi les espérantistes se sentent-ils concernés par le problème ? Parce qu'ils défendent la diversité linguistique, au même titre que la biodiversité, plus à la mode.



### 13 - Centre Culturel Espéranto-Marseille

Renée Triolle

#### Quiz et Galette des Rois

Mardi 7 janvier, la galette réunissait élèves et anciens élèves du cours, une excellente occasion pour tester ses connaissances culturelles. En effet un quiz en espéranto, conçu par des élèves, a été proposé tout au long de la soirée.

#### Volgogrado en Marsejlo

Survoje al MES, tri rusinoj (du el Ufa, unu el Volgogrado) haltis en Marseille, vizitis ĝin kun esperantistoj, kaj vespere, la 25an de februaro prezentis ĉe CIRA filmeton pri Volgogrado, la plej "longa" urbo de Rusio (90-kilometra).



Fondita sur la Volgo en 1589 kiel fortikaĵo, ĝi nomiĝis Caricino (urbo de la carino), sed ĝi estas ĉefe konata sub la nomo Stalingrado, kie okazis la fama batalo dum la Dua mondmilito. Tie venkita kaj haltigita estis la germana armeo, sed ĉefe tiu batalo estis psikologia ekkonscio, ke eblas venki Hitleron. Rekonstruite, la urbo ŝanĝis sian nomon al Volgogrado en 1961 sed

daŭre konservas kaj eĉ flegas la memoron pri la milito. Pli gaja estis alia filmeto pri folkloraj dancoj en Ufa, ĉefurbo de Baŝkirio, "la plej orienta eŭropa urbo" ĉe la piedo de Uralo. Por novaj lernantoj de Esperanto, tiu renkontiĝo estis la unua kontakto kun eksterlandanoj, kaj ili respondis demandojn de Nina kaj Tatjana. Aperitivo permesis pluajn interŝanĝojn.

### Junuloj fronte al diskriminacio

Lunde la 27an de januaro, datreveno de la liberigo de la koncentrejo Aŭŝvico, la lernantoj de la internacia mezlernejo «Collège Monod» en Les Pennes Mirabeau (13) prezentis dum tuta posttagmezo la rezultojn de plurmonata laboro pri la temo "genocido kaj diskriminacio".

Kial Esperanto estas koncernita? Ĉar en la departemento kun ĝi rilatas Rosy Inaudi, departementa konsilantino kaj esperantistino.

Tiel, en unu el la laborgrupoj, kiu prilaboris antaŭjuĝojn, aperis Esperanto inter la diversaj lingvoj, dank' al la interesiĝo de instruistino pri angla lingvo.

Tre diversaj estis la laborgrupoj, kiuj prezentis sian laboron dum dek minutoj al cirkulantaj grupoj. Pri la judoj, lernantoj de la 5a klaso enscenigis elтираĵojn de la libro "Paroloj de steloj" (kompilado de rememoroj de judaj infanoj); ĉiuj lernantoj de 3aj klasoj desegnis portretojn, kiuj pendis sur muro, aŭ kuŝis surtere por montri la daŭrigon de diskriminacio; iuj bruligitaj aŭ ŝiritaj. Alia laborgrupo enscenigis ĉambron rapide forlasitan post aresto: renversita seĝo kun falinta jako, ŝuoj; tie ankaŭ tuta muro el diversaj skatoloj, kiuj reproduktis diversajn ĉambrojn.

Sed la lernantoj omaĝis al aliaj genocidoj: tre simbola afrika danco dum filmo montras Ruandon; deklamado en la itala kaj armena kun akompano de violonĉelo por memori la genocidon de la armenoj en 1915.

Ĉar genocido naskiĝas en la mensoj de la homoj, necesas pripensi la kialojn: lernantoj proponis vivon de Roberta, Nobel-premiita pri paco kun aktivaj ludoj por montri, ke eblas plurope ŝanĝi la situacion; deklamado favora al ekologio, aŭ kontraŭ diskriminacio inter riĉuloj kaj malriĉuloj, aŭ turmentado, kiu kondukas al memmortigo.

Entute tre riĉa posttagmezo kaj gratulojn al la lernantoj kaj iliaj instruistoj!



## Espéranto : diplômes pour quatre fidèles sociétaires

Samedi dernier, sur l'initiative de l'association Espéranto Provence présidée par Pierre Oliva, le pôle d'animations culturelles Saint-Exupéry a servi de cadre à une remise de diplômes. Des diplômés de premier et second niveaux ont été remis par Renée Triolle, déléguée de l'Espéranto France auprès de l'Unesco Paris, responsable des examens, à quatre élèves de l'association ayant réussi leur examen, en l'occurrence Christine Biancheri, Colette Audoué, Marc Chaminade et Monique Flory. Ces diplômes étaient accompagnés de livres et autres cadeaux offerts par l'Espéranto France. M<sup>me</sup> Triolle, qui fut le professeur de Pierre Oliva et Nicole Ladite, deux des piliers du club beaussetan, est également la présidente du club Espé-



Remise des diplômes à leurs récipiendaires.

(Photo J. L.)

ranto de La Ciotat. Organisé dans une ambiance cordiale et bon enfant ce cérémonial officiel a été suivi par le partage du traditionnel pot de l'amitié.

### Langue universelle

Enseigné au sein de l'association Espéranto Provence basée au Beausset, qui organise des stages réguliers et de niveaux divers, cette lan-

gue usuelle, dûment reconnue par l'Unesco, est décrite comme « un langage pratique et rationnel qui contribue beaucoup au rapprochement des peuples ». C'est la seule et unique langue universelle ayant dépassé le stade de projet pour devenir une langue vivante à part entière pratiquée par des centaines de milliers de locuteurs à travers le monde.

Conçu et développé à partir de 1887 par le médecin polonais Ludwik Lejzer Zamenhof, ce langage planétaire a pour but de faciliter la communication entre les hommes.

J. L.

Association Espéranto Provence,  
tél. : 06.76.55.57.23  
Courriel : nlpolecamp@gmail.com



### 83 - Espéranto - Le Beausset

#### Nicole Lafitte kaj Piere Oliva

Kvar membroj de nia klubo sukcesis sian FEI-ekzamenon.

Nome de Franca Esperanto-Instituto, R. Triolle enmanigis al ili la diplomojn.

Gratulojn al Christine, Colette, Monique kaj Marc !



Mediterranea Esperanto-Semajno

# L'Espéranto, trait d'union entre les peuples



Une centaine d'Espérantistes étaient réunis aux Issambres pour le 14e stage international d'Espéranto organisé par le club Fréjus-Saint-Raphaël. (Photo Fred M.)

Ils sont arrivés aux Issambres le 27 février et depuis, les murs du Vacanciel des Issambres ne résonnent plus que d'une seule et même langue faite pour unir les peuples : l'Espéranto. Venus de toute l'Europe, une centaine d'adeptes de cet idiome universel étaient réunis toute cette semaine pour assister au quatorzième stage international organisé chaque année par l'Espéranto club Fréjus-Saint-Raphaël. Cours, conférences, visites des richesses patrimoniales locales et même un concert en

Espéranto ont agrémenté leur séjour sur le littoral varois. Qu'ils soient Scandinaves, Anglais, Espagnols ou Russes, l'échange verbal n'est ici plus un obstacle à la communication grâce à leur pratique du langage créé en 1887 par le docteur polonais Louis-Lazare Zamenhof. Un dialecte phonétique logique à la portée de tous quels que soient leurs origines ou leurs facilités d'apprentissage d'une langue. Non seulement la pratique de l'Espéranto dépasse les frontiè-

res mais elle perdure depuis plus d'un siècle, et ne fait que se développer. Pour preuve, la présence cette année de quatre jeunes russes âgés de 13 à 28 ans, accompagnés de leur professeure Katerina Arbekovo, enseignante à Novossibirsk en Sibérie occidentale. Sachant se transmettre d'une génération à l'autre, l'Espéranto a donc encore de beaux jours devant lui.

FRED M.

Information : Esperanto club Fréjus-Saint-Raphaël : 04.94.83.06.88 ou 04.94.95.66.18 <https://esperanto-france.org/>

artikolo en Var-Matin, vendredon la 6an de marto, pri la Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres

La kursgvidantoj kaj organizantoj estis honorigitaj.  
De maldekstre dekstren :

Nina Korĵenevskaja, 3a kurso  
Élisabeth Ledru, 2a kurso  
Mikaelo Bronŝtejn, 4a kurso  
Bernard Bigonnet, ĥorestro

Christine Graissageul, 1a kurso kaj organizado  
Monique Prezioso, organizado  
Simone Marlier, organizado  
mankas Laurent Prezioso,  
kiu kontribuis en la organizado



En aldonitaj paĝoj (nur por la reta versio de la gazeto),  
vi trovos pliajn raporton kaj fotaron faritajn de Liba Gabalda, kiun ni kore dankas.

## ZEO-oj en Regiono SUD > 9 - Gargas (84)

### Pascal Vilain

Il y a un ZEO à Gargas, dans le Vaucluse : un "Parketo Madeleine Gibez" et peut-être même une "Aleo Esperanto".

Pour en savoir plus, j'ai contacté la Mairie de Gargas qui n'a pas pu me donner de renseignements et m'a dirigé vers la Résidence Autonomie - "Village Lubéron Château", où Madeleine Gibez a passé ses dernières années, jusqu'à son décès le 9 décembre 1998.

Sa directrice, Madame Hélène Boissy, que je remercie cordialement, a bien voulu m'envoyer quelques photos de sa pensionnaire et du petit parc qui porte son nom.

J'ai trouvé aussi un autre document correspondant à l'inauguration du "Parketo", en date du 27 juin 1999.

Enfin, j'ai appris l'existence d'une "Ligue des amis de Gargas et du Lubéron pour la défense de l'espéranto", mais je n'ai pas pu en savoir plus.



Madeleine Gibez



Parketo Madeleine Gibez



Connaissez-vous le site "UEA-facila" ?

Il est destiné aux personnes qui sont encore en phase d'apprentissage de l'espéranto et préfèrent lire des articles courts dans une langue simple.

Voici le texte de présentation du site :

En ĉi tiu retejo aperas informoj kaj novaĵoj pri UEA kaj la Esperanto-movado. La artikoloj estas mallongaj kaj facilaj por helpi homojn, kiuj nun lernas la lingvon, kaj ili enhavas nur la radikojn troveblajn en la listo de facilaj vortoj.

Le dernier article posté sur le site est d'actualité :

**"Kiel nomi tiun viruson ?"**

Vous pourrez non seulement lire le texte, mais aussi l'écouter, lu par l'initiatrice du site, Anna Löwenstein.

À la fin de chaque article se trouve une liste de quelques mots avec leur définition.

Donc, si l'actuel confinement vous laisse un peu de temps libre, pourquoi ne pas l'utiliser en visitant ce site ?

[C'est ici.](#)

HELPOSIGNOJ			
•	punkto	*	steleto aŭ asterisko
,	komo	“ ”	citiloj
:	dupunkto	'	apostrofo
;	punktokomo	/	suprenstreko
...	tripunkto	-	dividostreko
( )	krampoj	—	haltostreko
?	demandosigno	!	krisigno



**Plurelekta demandaro**  
laŭ verkoj de Robert Llorens  
eldonitaj de *Espéranto-Info*

### 1 - gramatika

a) La libro estas romano. .... rakonto estas interesa.

1 - lia ; 2 - ŝia ; 3 - ĝia

b) Li promenas kun ..... fratino (de li).

1 - lia ; 2 - ŝia ; 3 - sia

c) Ŝi promenas kun ..... frato (de ŝi).

1 - lia ; 2 - ŝia ; 3 - sia

### 2 - vorto-trezora

ĉ) elektu "antaŭpago", "avanco" aŭ "frueco" por traduki la francan "avance"

1 - financière : .....

2 - militaire : .....

3 - précocité : .....

d) elektu "krom", "kun" aŭ "per" por traduki la francan "avec"

1 - au moyen de : .....

2 - en plus de : .....

3 - en compagnie de : .....



**Superzam'**  
proponita de  
Jean-François Cousineau

### 1. En kiu lando okazis la unua ekster-Eŭropa Universala Kongreso?

a- Brazilo b- Japanio c- Usono

### 2. Kiu verkis Dancu marionetoj en 1927?

a- Baghy b- Schwartz c- Kabe

### 3. Kiom da homoj muzikis en Kajto dum sia unua periodo?

a- 4 b- 5 c- 6

### 4. En kiu urbo naskiĝis Zamenhof?

a- Bjalistoko b- Varsovio c- Vilno

### 5. Kiu korelativa ekaĵo signas montron?

a- i- b- t- c- ĉ-

### 6. Kiu estas la dua plej ampleksa lando en la mondo?

a- Ĉinio b- Kanado c- Rusio

Plurelekta demandaro	Solvoj de la demandoj	Superzam'
<b>1 - gramatika</b>	<b>en EP 118</b>	1 a > 688
a : 2 ; b : 1 ; c : 2	<b>aŭtuno 2019</b>	2 b > Baghy
<b>2 - vorto-trezora</b>		3 a > 1989
ĉ1 : ektagiĝo ; ĉ2 : padelo ; ĉ3 : albo		4 b > Varsovio ; 5 c > k
d1 : neniom ; d2 : neniel ; d3 : tute ne		6 c > Rusio (17M km <sup>2</sup> )

Avez-vous lu le dernier article posté sur notre site Espéranto-Provence ?

Il a pour titre : "2020-03 - Activités espérantistes durant le confinement".

Vous pourrez y découvrir, entre autres annonces, la création d'un groupe **Telegram** : **Esperanto en Provenco**.

Pour en savoir plus, [visitez cette page](#).



*Ĉi tiuj bildoj, kiuj rilatas kun la nuna pandemio, estas kompreneblaj sen komentoj.  
Sed ili povus eventuale vekii vian verkemon. Ne hezitu esprimiĝi... kaj sendi via(j)n teksto(j)n.*



## À noter sur votre agenda

En raison du confinement, dont nous ne connaissons pas la date de sortie, tous les événements mentionnés ci-dessous sont à lire au conditionnel. Les cafés linguistiques de Marseille et Hyères sont suspendus pour l'instant, les examens de juin n'auront lieu qu'en fonction de notre droit retrouvé de sortir. Quant aux rendez-vous de cet été, personne ne sait encore. Si les JO de Tokyo sont reportés à 2021... qu'en sera-t-il de l'UK de Montréal ? Les organisateurs continuent leur travail de préparation, en suivant attentivement l'évolution de la situation sanitaire.

### dans notre fédération

#### juin 27 - lieu à préciser

examens de l'Institut Français d'Espéranto

#### 1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille

Café linguistique - Brasserie Les Danaïdes

4 square Stalingrad, 13001 Marseille

#### dernier mercredi de chaque mois - 18 h - Hyères

Café linguistique - bar de l'hôtel Ibis-Gare

45 rue Edith Cavell (face à la gare)

### en France

#### Baugé (49) - Château de Grésillon

Les activités du 10<sup>e</sup> PRINTEMPaS ont été remplacées par des cours à distance sur le net.

pour plus d'infos : <http://gresillon.org/?lang=fr>

**juin 13 - Paris** : Assemblée générale d'Espéranto-France. Maison des associations des 3<sup>e</sup> et 4<sup>e</sup> arrondissements.

**août 15-21 - Plouézec** : Rencontres d'espéranto  
infos : [pluezek@armor-esperanto.fr](mailto:pluezek@armor-esperanto.fr)

### en Europe

#### juillet 11-18 - Someren (Pays-Bas)

76<sup>e</sup> Congrès international de la Jeunesse

infos : [ijk2020.tejo.org/](http://ijk2020.tejo.org/)

#### juillet 25 / août 1 - Białystok (Pologne)

93<sup>e</sup> Congrès de SAT - [kontakto@satesperanto.org](mailto:kontakto@satesperanto.org)

### dans le monde

**août 1-8 - Montréal - (Canada)** : 105<sup>e</sup> Congrès mondial d'espéranto

infos : <https://esperanto2020.ca/fr/accueil/>

*Maggy kaj Philippe Combot*

### Vanille-Bourbon, Vanilo en Reunio

Reunio estas la lando de sukerkano kaj de vanilo. Vanilo estas liano de orkideo, kiu volvas sin ĉirkaŭ arboj en arbaro. Ĝi bezonas ne tro da suno, ĝi vivas en la duonlumo sub la folioj de sia arbo-portanto. Ĝi devenas de Meksikio.

En Reunio oni kulturas tiun planton de la 19-a jarcento pro ĝia frukto, kiu tiel bone odoras post sekiĝo. En naturaj kondiĉoj, la vanila floro povas produkti guŝon, nur se malgranda muŝo envenas en la floron kaj disportas la polenerojn. Sed tiu malgranda muŝo vivas nur en Meksikio. Kiam do oni alportis vanilon al Reunio, la planto bone kreskis, floris, sed neniam donis fruktojn.

Iam juna sklavo, Edmond Albius, trovis manieron por movi la polenerojn interne de la vanila floro kaj tiel estigi la fekundecon de la planto. Pro tiu genia eltrovaĵo Reunio fariĝis tre grava produktanto de vanilo, multaj homoj riĉiĝis, krom, kompreneble, la sklavo, kiu laŭleĝe posedis nenion.



La produktado de odorriĉa vanilo estas longa afero. Por pli facile atingi la guŝojn, la kulturistoj devas malhelpi, ke la liano tro alten kresku: ili do faldas ĝin de tempo al tempo, deprenante la altan finon mal-supren kaj turnante ĝin je homa alteco (*vidu ĉi-kunan foton*). Por la fekundigo, oni devas pasi en la kampo ĉiun matenon ! La florojn oni devas pritrakti en la mateno, ĉar ili ne daŭras pli longe. Kiam oni rikoltis la guŝojn, oni metas ilin en varman akvon dum 3 minutoj, poste oni sekigas ilin sub la suno dum pluraj tagoj, kaj oni lasas ilin maturiĝi en lignaj kofroj dum pluraj monatoj. Oni devas poste apartigi la guŝojn laŭ la longeco kaj ligi ilin en fasketojn. La tuta procedo daŭras pli ol unu jaron kaj postulas multe da mana, senmaŝina laboro: pro tio vanilo estas tre kosta produkto.

Ni vizitis vanilan farmbienon kaj ni vidis en arbaro vanilan plantejon. Kaj ni eĉ havas du plantojn en nia ĝardeno, ili ankoraŭ ne alte kreskis, sed ni esperas...

## La 14-a Mediteranea Esperanto-Semajno en "Les Issambres" 29.2.2020 - 7.3.2020

### Liba Gabalda

La lastan superjaran tagon de februaro, la belega hotelo kaj feriejo Vacancel, en Les Issambres, akceptis centon da esperantistoj el diversaj landoj. Pro la kronviruso Kovid-19, disvastiĝanta fine de decembro en Ĉinio en la urbo Wuhan, kelkaj rezignis sian partoprenon. La viruso atingis Eŭropon en februaro kaj rapide disvastiĝis en pluraj landoj kaj tiam furoris precipe en Italio. Pro ĝi, nekutima situacio okazis: ĉe la alveno en aero ŝvebis nur flugantaj kisoj sen ĉirkaŭbrakumoj.

Venis esperantistoj el Francio, Belgio, Hispanio, Svedio, Italio, Finnlando kaj Rusio. Kun Katerina Arbekova el la urbo Novosibirsk, (kiu gvidis pasintjare la E-kurson) venis grupeto da gejunuloj, kiuj kun granda entuziasmo ĝuis kaj praktikis Esperanton.

La direktoro de la hotelo, s-ro Silvain Ceccoto, bonvenigis nin sabate antaŭ la vespermanĝo per aperitivo kaj deziris al ni agrablan restadon.

La programeroj de la feriejo, kiujn ni povis partopreni, proponis diversajn ludojn, arkopafadon, kvizon, malstreĉigan gimnastikon, loterion, minigolfon, diversajn ekskursojn, dancadon kaj aliajn amuzaĵojn.

Ankaŭ nia tutsemajna programo estis riĉa. Okazis kvar diversnivelaĵoj kursoj pri Esperanto. Komencantojn instruis Christine Graissaguel, tiujn, kiuj jam lernis kaj komprenas la lingvon gvidis Elisabeth Ledru (nomita Elinjo). Pli lingve progresantaj partoprenantojn paroligis Nina Korĵenevskaja, kaj por la plej spertaj Mikaelo Bronŝtejn pretigis varian programon: iom da gramatiko, kvizo, ŝercoj, kantado kun akompano de gitaro. Krome li donis al ni multajn informojn pri soveta Esperanto-movado kaj pri famkonataj rusaj esperantistoj. Ĉiuj kursoj agrable disvolviĝis kaj la lernantoj estis kontentaj. Dum la paŭzoj, Monique Prezioso kaj Simone Marlier pretigis kaj servis al ni kafon, diversajn infuzaĵojn kaj biskvitojn.

Oni vizitis la urbojn Fréjus kaj Roquebrune-sur-Argens. Iuj individue veturis al Saint-Tropez, kiu distancas nur dek kilometrojn de Les Issambres. Pro la pluvo kaj la forta vento la vizito al la lagetoj Villepey ne povis okazi. Tiam estis proponataj diversaj tabloludoj kun la intenco pliprofundigi la konon de Esperanto. Survoje laŭ la marbordo al la urbeto Biot, kie ni vizitis vitrofabrikon, ni admiris belan pejzaĝon.

Agrable estis admiri la sunleviĝon ĉe la proksima haveneto de Les Issambres, kie la mevoj salutas kaj adiaŭas la spektantojn. Dum la libera posttagmezo ni povis ludi kartojn aŭ promeni en la ĉirkaŭaĵo. Ĉe la marbordo en salono Batterie estis interesa ekspozicio pri la aviadisto, esploristo kaj verkisto Antoine de Saint-Exupéry, kiu loĝis en la regiono. En la loka ĵurnalo Var-Matin aperis artikolo pri nia aranĝo kun komuna foto.

Vespere ni ĝuis gitar-koncerton de Mikaelo Bronŝtejn, Nina Korĵenevskaja montris belajn bildojn de la pentristo Konstantin Vasilyev (1942-1976), kaj kun Nina Cvileneva ŝi prezentis al ni la urbon Ufa kaj ties folklorajn ensemblojn. Pri la urbo Volgograd prezentis filmon Tatiana Vtorova. Raïta Pyhälä rakontis pri la artisto Yrjö Saarinen kaj montris liajn pentraĵojn. Gunnar Olsson prezentis al ni bildojn pri sia kolekto de cent tri akordionoj kaj interese parolis pri ili. Ángel Garcia per filmo invitis nin al la ĉi-jara hispana kongreso, kiu okazos en majo en la pitoreska urbeto Comillas proksime al Santander. Edmond Plutniak parolis pri "Eta Pollando en Norda Francio". Temis pri poloj invititaj enmigri Francion komence de la 20-a jarcento por labori en karbo-minejoj. Ni eksciis pri iliaj malfacilaĵoj, kutimoj, folkloro, kristnaskaj, paskaj kaj geedziĝaj festoj, pri dancoj, sporto, kuirarto. Li entuziasme rakontis pri ĉiuj interesaĵoj. Ĉe la fino gaja muziko dancigis la ĉeestantojn.

Dum la adiaŭa vespero ĉiu kursgvidanto pretigis programerojn por distriĝo. Sonis kantoj kaj ni spektis amuzajn teatraĵetojn, skeĉojn, kvizon. Ĉe la fino mi invitis la partoprenantojn al la fervojista kongreso okazonta en Frankfurto-ĉe-Odro. Poste ni gratulis la kursgvidantojn kaj la organizantojn de la evento, kaj dankis ilin per donacetoj. Ne mankis kutima loterio kaj dancado kun akompano de akordiona muziko fare de filinoj Prezioso.

Necesas danki al la organizantoj de la evento, al Christine Graissaguel kaj al la familio Prezioso, kiu ĉiam estas preta helpi. Do, kun pacienco ni atendas plian inviton venontjare al tiu agrabla loko, kie floras mimozoj kaj kie oni bonege manĝas.

